

Londono Kantas

En la disko kaj aŭ kasedo

Kantas: Anoj de la Londona Esperanto-Klubo
Akompanas: John Brownlee (akordiono), Alan Fantom (bekfluto),
Arthur Gardner (kontrabaso), Heather Tokely (violono)
Solkantas: Lou Brooks kaj John Wells (*Klementin'*)
Ĥorestro: John Brownlee

Historio de la Londona Esperanto-Ĥoro

La Londona Esperanto-Ĥoro fondiĝis, preskaŭ hazarde, en 1976 kun nur kelkaj voĉoj kiuj kantis unuvoĉe en akompano de akordiono kaj gitaro. La gitaristo baldaŭ poste transloĝiĝis. En 1977 ĝi prezentis koncerton en 4-voĉa harmonio kun akordiono kaj alia gitaristo (Margaret Hill), okaze de la Brita Kongreso en Hastings. Poste, same en Morecambe (1978) kaj en Cheltenham (1979), kie ĝi ankaŭ partoprenis en la prezento de *La Piratoj de Penzanco* en Esperanto. Denove ĝi prezentiĝis en la Britaj Kongresoj en Edinburgo (1980) kaj Harrogate (1981).

Ekde la komenco ĝi kantis ĉe la specialaj kristnaskaj Esperanto-diservoj en decembro en Londono, kaj kelkfoje jare en la programoj de la Londona Esperanto-Klubo kaj aliloke. En 1982 ĝi prezentiĝis en la programo de la Universala Kongreso en Antverpeno dum la Interkona Vespero kaj dum la Malfermo. Ĉiu ano estis Esperantisto kaj ano de la Londona Esperanto-Klubo.

Ĉi tiu kantaro estas rezulto, post sukcesa prezento de la kantoj pere de la ĥoro ĉe la Interkona Vespero en Antverpeno, 1982, de kelkaj petoj de kursgvidantoj, instruistoj kaj klubaj aktivuloj, por havi facilan rimedon instrui kaj praktiki kantadon, ĉar mankas entute profesiaj muzikistoj en la ensemblo.

- John Brownlee

Londono Kantas

Kantvortoj el B.E.A. Kantokolekto

(Kompilis Mary Larrad kaj John Brownlee)

1. La Lingvo Por Ni	1
2. Plenigu Viajn Glasojn	1
3. Lorelej	2
4. Ĉiu, Ĉiu, Ĉiu, Ĉiu.....	2
5. Samideana Trinkkanto	3
6. Klementin'	3
7. Mariston Logas Vasta Mar'	4
8. La Fluanta Tajdo	4
9. Vivu la Stel'	5
10. Apudmoskvaj Vesperoj.....	5
11. Pola Trinkkanto.....	6
12. Sankta Luĉio.....	6
13. Verdin'	7
14. Knabino.....	7
15. Nia Klubo.....	8
16. Tik e Tik e Tok.....	8
17. Krokodilo	9
18. La Iamo Longe For.....	9
19. Tra l' Tuta Nokt'	10
20. La Espero	10

Ĉi tiun libreton eldonis Esperanto-Asocio de Britio
por akompani la diskon kaj kasedon "Londono Kantas"

© Esperanto-Asocio de Britio 2006

www.esperanto-gb.org

Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, Staffordshire, ST12 9DE, Britio

Ĉi tiun libreton eldonis Esperanto-Asocio de Britio
por akompani la diskon kaj kasedon "Londono Kantas"

© Esperanto-Asocio de Britio 2006

www.esperanto-gb.org

Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, Staffordshire, ST12 9DE, Britio

1. LA LINGVO POR NI

F. Douglas Murphy (angla tradicia)

1. Sur montoj kaj step' indianoj
ĉasadas kun ruĝfamili'
kaj se vi postulas parolon
kanjone eĥiĝas la kri'.

*Esperanto estas la lingvo por ni, por ni!
Esperanto estas la lingvo por ni!*

2. En densa afrika ĝangalo
nigruloj sen teknologi'
jam solvis la lingvan problemon
tamtame resonas la kri'.
3. Ĉe norda poluso eskimoj
loĝadas en neĝ' kaj glaci'.
Se ili bezonas parolon,
aŭdiĝas tutsame la kri'.
4. Sur tuta la vasta terglobo
en urboj de ĉiu naci'
troviĝas samideanaro
kaj sonas de buboj la kri'.
5. Indianoj, nigruloj, eskimoj,
urbanoj kaj buboj kaj ni
jam uzas la Zamenhof-lingvon,
do vivi, prosperu la kri'.

2. PLENIGU VIAJN GLASOJN

H.W. Holmes (angla tradicia)

1. Plenigu viajn glasojn ĝis la vino superfluas.
Ĉar venu morgaŭ kio ajn, la nunon ni tre ĝuas.

*Gajaj estas ĉiuj ni,
gajaj estas ĉiuj ni,
gajaj estas ĉiuj ni,
ĝis morgaŭ for la zorgoj.*

2. Tutkore ni kuntostu al la ĝoj' de amikeco.
Se iu ĝin rifuzas li ne estas homa speco.
3. Al amo ankaŭ trinku, ĝi meritas la honoron.
Eĉ se kun feliĉeco ĝi alportas la doloron.

19. TRA L' TUTA NOKT'

Trad. W. Maynard, A.B. Deans (kimra)

1. Ne timetu, kara mia, tra l'tuta nokt'.
Paca restu koro via, tra l'tuta nokt'.
Ĝojo en mateno venos,
ree vin espero benos,
eĉ se dormon sonĝoj ĝenos
tra l'tuta nokt'.
2. Vin anĝeloj prizorgados tra l'tuta nokt',
liton vian ĉirkaŭados tra l'tuta nokt'.
Ili vin kun amo Dia
gardos de danĝero ĉia;
dolĉa estu dormo via
tra l' tuta nokt'.

20. LA ESPERO

L.L. Zamenhof

1. En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion;
al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.
2. Sub la sankta signo de l'espero
kolektiĝas pacaj batalantoj,
kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj;
sed dissaltos la obstinaj baroj,
per la sankta amo disbatitaj.
3. Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian,
la popolo faros en konsento
unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela sonĝo de l'homaro,
por eterna ben' efektiviĝos.

17. KROKODILO

(franca kanto)

1. La krokodil', irante al milito, al la idar' adiaŭ diris ĵus,
foriris ĝi muĝante kun ekscito pri elefantoj pensis ĝi kun ruz'.

*Se la kro-kro-kro, la kro-kro-kro, la krokodiloj,
Malaperis for en Nil', ni ne parolu plu.
Se la kro-kro-kro, la kro-kro-kro, la krokodiloj,
Malaperis for en Nil', ni ne parolu plu. O-e!*

2. Murmuris ĝi militan marŝon glute inter la dentoj, vortoj restis for,
kiam la faŭkon ĝi malfermis tute, la malamikoj tremis en la kor'.
3. Ĉe Nilo-bordo zumis ĝia kanto kaj ĉio tremis ĉe la bord' de Nil'.
Sed subite venis elefanto kaj malaperis brava krokodil'.

18. LA IAMO LONGE FOR

Trad. Reto Rossetti (skota tradicia)

1. La pra-konatojn ĉu ni lasu velki en memor'?
Ĉu ni ne pensu kare pri la iamo longe for?

*Iamo longe for, karul', iamo longe for:
ni trinku en konkordo pro la iamo longe for'!*

2. La kruĉojn do ni levu kaj salutu en la kor',
kaj trinku en konkordo pro la iamo longe for!
3. Montete iam kuris ni kaj ĉerpis el la flor',
sed penan vojon spuris nin post iamo longe for'.
4. Geknabe ni en fluo vadis ĝis vespera hor',
sed maroj muĝis inter ni post iamo longe for'.
5. Do jen la mano kamarad', ni premu kun fervor'
kaj trinku ni profunde pro la iamo longe for'!

3. LORELEJ

Trad. L. Elb (H. Heine)

1. Ne scias mi, kial mi estas
malgaja en la kor';
antikva fabelo restas
por ĉiam en mia memor'.
Vespero ja ekmalheliĝas,
fluadas la Rejn' en trankvil';
la supro de l'monto lumiĝas
en vespersuna bril'.
2. Belega knabino jen tronas
kun ora juvelar';
la belan vizaĝon kronas
mirinde la ora harar'.
Ŝi uzas la oran kombilon,
kaj dume kantas ŝi,
sed havas strangan stilon
sorĉigan la melodi'.

3. Kaj sopiregon eksentas
ŝipisto dum sia vetur';
rifaron li ne priententis,
ĉar altenrigardas li nur.
Mi kredas, ke dronas do fine
ŝipisto kun sia boat',
kaj tion kaŭzis feine
la Loreleja kantad'.

4. ĈIU, ĈIU, ĈIU, ĈIU

Raymond Schwartz

1. Se iu venas, eĉ el Afrik'
ni lin komprenas sen helpo de mimik'
kaj se vi iras al Amerik'
tuj iu diras "Sidiĝu do, amik'!"
2. Ĉiu sinjoro dediĉas sin,
el tuta koro al ĉarma kursanin',
se ŝi hezitas pri l'gramatik',
li ŝin invitas volonte al praktik'.
3. Ni dumkongrese kunvenas por
konsenti jese kun ĉiu orator',
kaj eĉ l'eterna statutbatal'
finiĝas per la plej harmonia bal'.

5. SAMIDEANA TRINKKANTO

Frans Swagers (germana tradicia)

1. Por Esperanto,
se vi klopodas kiel ni,
kaj pace varbas
ĉiun por ĝi.

*Jen mia mano, samideano!
Ĝoju ni, trinku ni, je via sano!
Ĝoju ni, trinku ni, je via sano!*

2. Se l'antaŭjuĝon
malhelan de la nuna hor'
per verda stelo
pelas vin for.

3. En estonteco
se fine venkos nia pen',
nin rekunigos
granda festen'.

6. KLEMENTIN'

H.W. Holmes

1. En kaverno en kanjono
laborante je la min',
estis patro, vere mastro,
de filino Klementin'.

*Mia kara, mia kara, mia kara Klementin',
vi perdiĝis nun ĉiame, bedaŭrinde, Klementin'.*

2. Elefante, tre gracia
delikata pezulin',
pakajkesto, taŭga vesto
por pied' de Klementin'.

3. Anasidojn al la akvo
ŝi kondukis laŭ rutin',
falas glite kaj subite
subakviĝis Klementin'.

4. La vezikoj el la buŝo
bobelsone tiris sin.
Mi kuraĝas, sed ne naĝas,
tiel dronis Klementin'.

5. Ŝia patro velkis tage
ĉar li tiel perdis ŝin;
li deziris kaj li iris
esti apud Klementin'.

6. En la songoj ŝi aspektas
tre ampleksa marvirin'.
Faras geston, kissugeston,
sed "Ne dankon, Klementin'."

7. Al mi mankis dolorige;
al mi mankis Klementin'.
Ŝin forgesas, mi konfesas,
pro la kisoj de fratin'.

15. NIA KLUBO

L. Denza (kanto de la Londona Esperanto-Klubo)

1. Ho, kie ni kun ĝojo renkontiĝas, ĉe nia klub', ĉe nia klub'.
Pri kio ni neniam ajn hontiĝas, ĉe nia klub', ĉe nia klub'.
Ke tie Esperanto disvastiĝas per forta pen', per forta pen'.
Amikoj alilandaj kungastigas ĉe la kunven', ĉe la kunven'.

*Venu, venu al la gaja rond'.
Ne plu restu fremda en la mond'.
Aliĝu vi kaj inter ni laboru vi en harmoni'.
Forte progresigi Esperanton en London'.*

2. Neniu estas tiom okupata, ĉe nia klub', ĉe nia klub'.
Ke komencanto restas nehelpata, ĉe nia klub', ĉe nia klub'.
Spertuloj ankaŭ ĉiam trovas ion en la program', en la program'.
Por pligrandigi eĉ la propran scion ol estas jam, ol estas jam.

16. TIK E TIK E TOK

Trad. Paul Bennemann (itala)

1. Tik e tik e tok, vi brunbelulino,
tik e tik e tok, mi amas vin kore.
La la la la ...
Vin, nur sole vin mi servas fervore,
vin mi ŝatas, plej kara trezor'.
2. Tik e tik e tok, vi brunbelulino,
tik e tik e tok, mi devas foriri.
La la la la ...
Kiom da dolor', vin ĉiam sopiri!
Certe preskaŭ rompiĝos la kor'.
3. Tik e tik e tok, vi brunbelulino,
tik e tik e tok, mi baldaŭ revenos.
La la la la ...
Tiam ĉe la brust' mi ree vin tenos,
feliĉegon ni sentos sen fin'.

13. VERDIN'

Trad. W. Auld

1. Vi min mistraktas, karulin',
min forpelante sen kompat';
mi jam delonge amas vin,
ĝojante pri l'komuna ŝat'.

*Verdin' estis mia ĝoj',
Verdin' plezurigis min,
Verdin' estis kora or'.
Neniu krom Damo Verdin'.*
2. Mi staris preta kun ofer',
por servi vin laŭ via vol';
mi riskis pri la viv' kaj ter',
vin sopirante per konsol'.
3. Sin vestis mia servistar',
en verdo por aklami vin;
ĉi tio bravis sen kompar',
sed vi rifuzis ami min.
4. Nu, preĝos mi al bona Di',
ke pliheliĝu la futur'.
Kaj antaŭ mia morto vi
min amos unu fojon nur.

14. KNABINO

Trad. Miyamoto Masao (pola)

1. Nu, knabino al arbaro, iris al verdej', ha, ha, ha!
Iris al verdej', ha, ha, ha! Iris al verdej'.

*Tra-la-la-la la-la-la-la, tra-la-la-la,
tra-la-la-la la-la-la-la, tra-la-la-la,
tra-la-la-la la-la-la-la, tra-la-la-la,
tra-la-la-la-la-la, tra-la-la-la-la.*
2. Ŝi renkontis ĉasisteton, karan, ĉarman plej, ha, ha, ha!
Karan ĉarman plej, ha ha ha! Karan ĉarman plej.
3. Ĉasisteto, ho, amata, mi tre amas vin, ha, ha, ha!
Mi tre amas vin, ha ha ha! Mi tre amas vin.

7. MARISTON LOGAS VASTA MAR'

E. Malmgren (sveda popolkanto el Finnlando)

1. Mariston logas vasta mar',
ondaro kaj muĝ'.
La ŝipon skuas la ŝtormar'.
Ne estas rifuĝ'.

*Nun ĝis revid', belega knabin',
revidos vi baldaŭ min!
Nun ĝis revid', belega knabin',
revidos vi baldaŭ min!*
2. Knabino mia diras: "Ĝis"
ĉe ondo kaj muĝ',
min ligas ŝia lasta kis'
jen estas rifuĝ'.
3. Ŝi flustras dolĉe en orel'
ĉe ondo kaj muĝ'.
"Revenu baldaŭ via vel'
al hejma rifuĝ'!"

8. LA FLUANTA TAJDO

Harrison Hill

1. Jen la kanto de kuraĝ'
por maristoj sur vojaĝ',
ĉar kuraĝon ĉiam donas melodi';
do, kunkantu maristar'!
Vi la rajton havas, ĉar,
la fluanta tajdo estas nun ĉe ni!

*Kantu, kantu kamaradoj!
Gloran estontecon havas vi:
estas hela la ĉiel'
ĉiam brilas nia stel',
la fluanta tajdo estas nun ĉe ni.*
2. Kontraŭ vento, kontraŭ ond'
kunbatalis nia rond',
post la nuboj ofte kaŝas sin la stel';
sed la tajdo venas nun,
sin prezentas oportun',
kaj la stelo klare brilas el ĉiel'.
3. Do, altiĝu nun la kor',
la ventegoj pasis for,
kaj la teron preskaŭ vidi povas vi;
helpa vento blovas nun,
kaj ekbrilas varma sun';
la fluanta tajdo estas nun ĉe ni.
4. Levu velojn al ventet'
levu voĉojn al kantet'
levu korojn al ĉiama la esper';
kaj altiĝu la kuraĝ',
ĉar la fino de l'vojaĝ'
estos nepre la triumfo de l'Afer'.

9. VIVU LA STEL'

Agnes B. Deans

1. Plenigu la glason, ho ĉiu bonul',
vivu la verda stel'!
Kaj kantu la homoj el ĉiu angul',
vivu la verda stel'!

*Vivu la, vivu la, vivu la stel',
vivu la, vivu la, vivu la stel',
vivu la stel', vivu la stel',
vivu la verda stel'!*
2. Plenigu la glasojn kaj tostu kun mi,
vivu la verda stel'!
La lingvon kreitan por ĉiu naci',
vivu la verda stel'!
3. Per voĉoj de nia kunbatalantar',
vivu la verda stel'!
Resonu la voko sur tero kaj mar',
vivu la verda stel'!

10. APUDMOSKVAJ VESPEROJ

Trad. K. Gusev

1. Ne aŭdiĝas eĉ flustro en obskur', ĉio dormas nun tie ĉi.
:Kiel ŝatas ja, se vi scius nur, apudmoskvajn vesperojn mi.:
2. Iom plaŭdas flu' kaj ne plaŭdas plu, plenas de arĝent' la river'.
:Kanton aŭdas mi kaj ne aŭdas plu en mallaŭto de la vesper' .:
3. Kial, kara, vi kapon klinas pli, kaj rigardas nun ruze min?
:Ĉu esprimas mi, ne esprimas mi. Kio ardas en la anim'?:
4. Kaj alvenas jam la matena hor', brilas ruĝa jam lumlini'...
:Tenu en memor', tenu en la kor' apudmoskvajn vesperojn ni.:

11. POLA TRINKKANTO

Trad. P. Bennemann

1. Miĥael', al via sano! Koba, he, por vi!
Trinkas mi kaj trinkas vi, la tuta kompani'.
Kiu ne eltrinkas nun, tiun trafu forta pun'!
Trinku, trinku, trinku nun!
Kiu ne eltrinkas nun, tiun trafu forta pun',
haja, haja, haja, haja, batoj per baston'!
2. Bovrostaĵon, ovokukon manĝis la sinjor'
la sinjoro nia, manĝis, trinkis ĉion for.
Sed hodiaŭ manĝas li ranojn kaj limakojn - fi! -
kiel, kiel cikoni'.
Kiu ranojn manĝas nun tiun trafu forta pun',
haja, haja, haja, haja, batoj per baston'!

12. SANKTA LUĈIO

Trad. Cl. Bicknel (itala)

1. Sur la mar' brilas stel' de arĝento,
dolĉe favoras ondoj kaj vento;
:dancas la barko kiel folio;
Sankta Luĉio, Sankta Luĉio!:
2. Bone ni fartas en la barketo
pro la dolĉega, kara venteto;
:venu do, preta nun estas ĉio;
Sankta Luĉio, Sankta Luĉio!:
3. Kiu nun hejme volas restadi!
Venu en barkon vespermanĝadi!
:Venu vojaĝi, benos nin Dio;
Sankta Luĉio, Sankta Luĉio!:
4. Maro, venteto, ambaŭ ridetas,
Kaj la maristo zorgojn forĵetas;
:gaje kaj ĝoje jen lia krio!
Sankta Luĉio, Sankta Luĉio!:
5. Dolĉa Napolo tero amata,
Per la rideto Dia benata,
:vi, reĝolando de harmonio!
Sankta Luĉio, Sankta Luĉio!:
6. Kial vi haltas? De la vespero
Pure, varmete blovas aero.
:Do en la barkon saltu pro tio!
Sankta Luĉio, Sankta Luĉio!: